

AVENO 36 - Homaj Rajtoj tutmonde

aktuale 2010-10-01 ghis 2011-05-27

La temoj estas ordigitaj jene: Tutmondaj, Afriko, Azio, Ameriko, Australio, Europo & Rusio
Glosareto: FYEG/FJEV = Federacio de la Junaj Europaj Verduloj

Gratulon al Amnestio Internacia por 50 Jaroj da defendo de Homaj Rajtoj aparte de politike malliberigitaj kaj torturitaj homoj. Al defendas la rajton al sen-perforta agado kontraŭ registara arbitreco kaj despoteco. Legu pli sur vikipedio kaj iliaj ret-paghoj:

"Aparte, Amnestio Internacia kampanjas por liberigi ĉiujn prizonulojn de konscienco; certigi justan kaj senprokrastan proceson por politikaj prizonuloj; abolicii la mortpunon, torturon, kaj aliajn kruelajn traktadojn de prizonuloj; fini politikajn mortigojn kaj "malaperojn"; kaj kontraŭi ĉiujn homrajtajn mistraktojn, ĉu per registaroj aŭ per opoziciaj grupoj." (eo.wikipedia.org)
(ar, en, es, fr) <http://www.amnesty.org/> - tie vi trovos ligojn al naciaj sub-grupoj de AI.

Komento de AVE/mw: Per tiu senperforta agado AI savis multajn vivojn, ĉar jam la publikigado de la mistrakto de unuopuloj premas tiajn registarojn, lasi ilin. Ankoraŭ - kaj eble eterne - chie en la mondo povas instalighi despota reghimo, kiu tute ne emas respekti la Internacian Deklaracion de la Homaj Rajtoj. Sed ankau en ŝtatoj kie la politikaj fortoj estas sendependaj unu de la alia (principo de jurshtato: leghdonado, justico, ekzekutivo, kaj jhurnalismo) povas okazi ke necesas publikigi lezojn de la Homaj Rajtoj. Domaghe ke - ekzemple - Usono ankoraŭ ne akceptas la Internacian Jughkortumon en Den Haag, kie eblas puni ŝtatestrojn, ktp. de iu ajn lando.

--- Tutmonde ---

2010-12-23, Nuntempe **en multaj ŝtatoj okazas mistrakto de politike pensantaj civitanoj** se ili estas disidentoj kontraŭ sia malbona registaro au baloto-falsigoj. Jen surface nur kelkaj prijuĝoj, kiuj ĉefe rilatas al la sinteno de la registaroj kontraŭ la homoj. En preskaŭ ĉiuj landoj okazas lezoj de la Homaj Rajtoj.

Europo: Belorusio, la lasta diktaturo en Europo, lasis ludi balotadon; poste enkarcerigis manifestaciantojn kiuj protestis kontraŭ la falsaj kondiĉoj.

Frontex baras EU-Europon kontraŭ fughantoj.

La nomada popolo de la Romaoj ne ghuas la samajn rajtojn kiel la malnomadoj.

Rusio: jughkortumoj ne sendependaj (rilate la interesojn de la regantojn kaj oligarĥojn), jhurnalisto estas minacataj kaj mortigataj; la civila socio fakte ne havas rajtojn protesti.

Afriko (k.a.): prezidentoj ighas koruptaj despoto-familioj kiuj elsuchas la valorajhojn de la lando.

Azio: Uzbekio, P.R.Chinio, Irano (disidentoj kaj virinoj), Israelo (ne respektas la limon de 1967).

Chinio ne respektas la rajtojn de la t.n. autonomaj provincoj: Tibeto, Turkestano, Interna Mongolio; sed ankau inter han-ĉinoj estas granda malegaleco pro la mon-avido; la justico ne estas sufiĉe forta kaj sendependa.

Usono: ankoraŭ malliberigas homojn en Guantanamo sen atenti ties Homajn Rajtojn. La jugh-sistemo estas influata de rasismo kaj diferencigo lau sociala statuso. Pafoj el tele-aviadiletoj mortigas ofte civilulojn. Usono ghis nun ne submetis sin al la UN-Jughkortumo.

Teroristoj - pro diversaj kauzoj - mortigas civilulojn; kelkfoje ili pretendas agi por religia celo.

2010-12-17, FYEG /FJEV atentigas pri la problemo de **Perforto Kontraŭ Virinoj**

La 25a de Novembro estas la oficiala rememor-tago pri Perfortado Kontraŭ Virinoj.

Milionoj da virinoj el ĉiuj partoj de la mondo estas minacataj per perforto, tenataj kontraŭvole, ekspluatitaj por sekso, devigitaj labori kaj mortigitaj, krome ĉirkaŭ du milionoj est ŝakrataj ĉiujare laŭ UN takso.

En multaj landoj ankoraŭ mankas konvena leĝo batali edzinigh-perforton.

Bona Politiko bezonas sufiĉan nombron de virinoj en ĉiuj ekonomiaj decidoj. Pli da virina partopreno en ĉiu parto de socio estigas plibonigon en ekonomio. Perforto kontraŭ virinoj povas esti reduktota se virinoj ricevas la samajn ŝancojn kiel viroj al gvidantaj pozicioj. FYEG bonvenigas la Protekto-Ordonon de la Eŭropa Parlamento, kiu helpas virinojn havi protekton kontraŭ perforto en ĉiuj EU-ŝtatoj.

Por pliaj informoj, bonvolu kontakti la FYEG Laborgrupo pri Sekso/Ghendro: terry@fyeg.org

FJEV = Federacio de Junaj Europaj Verduloj, <http://www.fyeg.org>

2010, La NRO **Target kampanjas kontraŭ la virina mutilacio**, FGM, (leginda: Waris Dirie "Dezerta Floro"): (ar, de, en, fr) <http://www.target-human-rights.de/>

APC subtenas la Liberecon je Informado, kaj tial alvokas al registaroj ne malliberigi la fluon de informoj aparte kiam temas pri transparencio/travideblo de registara farado. Civitanoj devas kontroli siajn registarojn: <http://www.apc.org/en/node/11620/>

Artikolo pri **Penso-polico** proponita por enŝoviĝi en 'konspir-teoriajn' grupojn. (lau Ian Fantom, el MAS-diskuto, 2010-10-23): <http://eo.mondediplo.com/article1649.html>

Eble vi rememoras la belan afiŝon "**Paco**" kun totemo de Irokese tribo kun la mesago en Esperanto kaj 117 aliaj lingvoj (publikita en "Akwasasne Notes", tradukita de Sean O'Riain):

Paco ne estas nur la kontraŭo de milito -
ne nur la periodo inter du miltoj.
Paco estas multe pli.
Paco estas la legho de la homa vivo.
Paco estas tiam, kiam ni agas juste kaj
kiam inter chiuj unuopaj homoj kaj chiuj popoloj regas justeco.

Ankaur la aktualaj socialaj **Jasmenaj Revolucioj** rezignas la perforton (plejparte), kaj nur postulas justan registaron. Jen pli ampleksa dokumento kiamaniere venki la perforton - okaze de la "Dekado kontraŭ Perforto" de la ekumena konsilio de la eklezioj - en la jenaj lingvoj (de, en, es, fr): <http://www.gewaltueberwinden.org/de/materialien/oerk-materialien/dokumente/erklaerungen-zum-gerechten-frieden/ein-oekumenischer-aufruf-zum-gerechten-frieden.html>

<http://www.vaincrelaviolence.org/fr/ressources/ressources-du-coe/documents/declarations-sur-la-paix-equitable/appel-oecumenique-a-la-paix-juste.html>

Ghenerala pagharo (de, en, es, fr): <http://www.gewaltueberwinden.org>

--- Afriko ---

Kiel haltigi la teroron de **diktatoroj** (Sirio, Libio, Bahrejno) kontraŭ sia popolo ?

Tunezio: gratulon al la demokrata movado sed samtempe mi deziras ke ili povas trovi pli trankvilan vojon. Necesus vereco-komisiono por klarigi la trompojn de la antaŭa registaro.

Sudano: bondezirojn - ke la nordo respektos la disiron de la sudo, kaj espereble ili trovos vojon por balancita divido inter la resursoj.

(la referendumo estis tute klare - sed ankoraŭ mankas la konsento inter la nafto-enspezoj)

2011-04 **Deklaracio de la popolo de Saharo (saharui) 1979 en Esperanto:**

La Araba Sahara Popolo, memorante la popolojn de la mondo kiuj proklamis la ĉarto de la Unuiĝintaj Naciojn, la Universalan Deklaracion pri la Homaj Rajtoj kaj la Rezolucion 1514 de Unuiĝintaj Nacioj (XV), kaj konsiderante la tekston de tiu rezolucio kiu asertas: "La popoloj de la mondo proklamantaj la ĉarto de Unuiĝintaj Nacioj refirmigas la fidon en la fundamentaj rajtoj de la homo, en la respekton kaj valoron de la homo, en la egaleco de la rajtoj de viroj kaj virinoj de nacioj grandaj kaj malgrandaj antaŭenirigi la socian progreson kaj plialtigi la viv-nivelon ene de ampleksa kompreno de la libereco."

Proklamas: "... defendi sian sendependiĝon kaj sian teritorian integrecon kaj kontroli siajn naturajn resursojn kaj riĉecon, luktas apud la popoloj amantaj la pacon por la konservado de la ĉefaj valoroj de paco kaj internacia sekureco."

<http://sahara-esperanto.ueuo.com/>

2011-05-16 **Ugando** retiris la leghproponon "Mortpuno pro samseksemo". AVE dissendis peticion de AVAAZ - kaj pluraj AVEanoj reagis pozitive. Fulmrapide 1,6 milionoj subskribis la AVAAZ-Peticion. Frank Mugisha elkore dankis por tiu tutmonda solidareco, kiu estis decida por la retiro. Kaj ankaur la EU-Reprezentanto por Komuna Ekstera- kaj Sekureco-Politiko dankis al AVAAZ kaj la tuta civila socio por tiu pozitiva kunagado. (en 8 lingvoj) <http://www.AVAAZ.org>, 2011-05-16

--- Ameriko ---

2011-03-09 **Illinois, kiel la 16a lando de Usono, abolicis la mortpunon:** la guberniestro Pat Quinn shanghis la 15 pendantajn ekzekutojn al tutviva mallibero. Dankon al li kaj la defendantoj de tiu plej grava homa rajto.

2010-11 **Balotoj en Usono** - Obama klopodis kaj reformis - la homoj ne meritis tion. Same kiel aliaj - mi kaj AVE esperas ke restas multaj mempensantaj civitanoj en Usono kiuj ne lasas sin trompi pere de dekstrula Tea-Party kampanjo, kiu estas nutrata de cent-milionoj de richuloj, kiuj ne volas disdividi sian trezoron. Ilia agado similas al sorchisto-chasado. Obama heredis de la Bush-registaro gigantajn problemojn (shuldojn, militojn, malhonoron de Usono), por tio li ne kulpas. Obama ne povis shanghi chion tuje, kaj neniu alia estus povinte fari tion - chu ne ?

Sed kelkaj estis bonaj: komuna san-asekuro, pli rigoraj reguloj por la finaca merkato, redukti la dependecon de fosiliaj energioj, bremsi kruelajhojn en la usonaj milit-kampoj. Ekz-e investi en alternativajn energiojn kreus multajn laborlokojn, jam malfermis nova fabriko de vento-generatoroj (Nordex) kaj la gigantaj projektoj por sun-termaj generatoroj en la dezerto komencighis. Alia kampo estus la publika transporto kaj ordigo de la infrastrukturo, por igi malpli dependa de la nafto, por kiu ili ja militas en Irako.

--- Azio ---

2011-04 P.R.Chinio malliberigas defendantojn de la Homaj Rajtoj: **Al WeiWei kaj LIU XiaoBo (kaj multajn aliajn)** – longe sen informo kie ili trovighas. La registaro pretendas ke estas intern-china politika afero - sed fakte estas kontraŭ la deklarigitaj Homaj Rajtoj. Eble la china registaro timas, ke la viruso de libereco el arabaj landoj povus ghermi ankaŭ en Chinio - prave - necesus.

2010-12-10, Oslo - **Nobelpremio 2010 por la Paco: LIU XiaoBo** ricevis la premion pro sia longdaŭraj klopodoj por pli-demokratigi la P.R.Chinion. Li kunverkis la Charton 08, kiu prezentas la vizon de jurshtata kaj demokratia Chinio, ekz-e por la Homaj Rajtoj je informado kaj protestado. Pro tio li estis punita al 11 jaroj, kaj lia edzino ne rajtas movighi libere.

Li estas la dua premiito kiu ne rajtis - au persone au pere de familiano - akcepti la premion.

La unua (1935/36) estis Karl von Ossietzky, disidento en la nazia Germanio, kiu mortis pro malhumanaj kondiĉoj en la pun-lagro. Specifaj postuloj de la **Charto_08** estas:
(lau Vikipedio - ankoraŭ ne en Esperanto; **krominformo, komento de AVE/mw*)

1. Amendi la Konstitucion.
2. Apartigo de la potencoj.*1
3. Leĝdona demokratio.
4. sendependa juĝistaro.
5. Publika kontrolo de ŝtatoficistoj.
6. Garantio de homaj rajtoj.
7. Elektiĝo de publikaj respondeculoj.
8. Abolicio de la Hukou sistemo.*2
9. Libera asocio.
10. Libero de kunvenado.
11. Libero sin esprimi.
12. Religia libereco.
13. Civita edukado.
14. Libera merkato kaj protekto de privata posedajho.
15. Financa kaj imposto reformo.
16. Sociala asekuro.
17. Protekto de la medio.
18. Federala respubliko.
19. Enkonduko de Vereco-Komisiono.*3

*1) Leghdonado, Registaro, Jughado - tio estas la ĝenerale akceptita bazo de jurshtata ordo.

*2) La Charto_08 postulas samrajtigon inter urbanoj kaj vilaghanoj.

*3) Postmilita informo, priserĉo kaj punado de politikaj krimoj.

Charto 08: <http://www.nybooks.com/articles/archives/2009/jan/15/chinas-charter-08/>

Ideoj pri Revolucio, aparte pri la china: <http://www.tsquare.tv/links/LiuXiaobo.html>
Komento (AVE/mw): La china registaro perfidas la Charton_08 kiel "okcidenta"; shajnas ke ankoraŭ la historio de la okcidenta koloniigo de Chinio restas baza psika problemo. Eble necesas vereco-komisiono (19) ankaŭ pro tiuj historiaj krimoj fare de la "Okcidento".
La Charto_77 estis protesto kontraŭ lezoj de la Homaj Rajtoj en la tiama Chehho-Slovakia Respubliko; hodiaŭ ghi estas akceptita kiel bona komenco de malferma civitana politiko.

2010-11 P.R. **Chinio** - la registaro ne akceptas prezenti problemojn. Eble ni jam forgesis la skandalon de venenigo de akvumita lakto per melamino por shajnigi la normalan kvaliton. Minimume 6 beboj mortis kaj 300 mil malsanighis pro reno-shtonoj. **Zhao Lianhai**, kies 3-jara filo estas inter la malsanigitaj infanoj, defenidas la rajtojn de la konsumantoj kaj helpis al la homoj per retpagharo "hejmujo por reno-shtonaj beboj" kun medicinaj kaj juristaj informoj. Malgraŭ legho kiu ebligas kolektivajn akuzojn la registaro ne volis damagho-kompensan proceson, ĉar tiam montrighus kun-kulpo de la konsumantoprotekta aŭtoritato - kiu volis kashi la skandalon antaŭ la olimpikaj ludoj. Oni nur akuzis kelkajn kulpulojn. La gepatroj restis kun siaj malsanaj infanoj sen kompenso. Finfine li translokigis la inform-retejon en eksterlandon kaj faris manifestaciojn kun pluraj gepatroj. Pro tio li estis punita al 2,5 jaroj mallibereco pro "Instigo al publika maltrankvilo". (lau BZ, 2010-11-11, p. 4), kaj jJen pli detale de Amnestio Internacia:
<http://www.amnesty.de/urgent-action/ua-311-2009-1/prozess-gegen-menschenrechtler>

P.R.Chinio - **Tibeto** - al okcidenta trezorejo mankas Homaj Rajtoj:
La fratoj **Karma Samdrup**, Rinchen Samdrup kaj Jigme Namgyal fondis la "Tri Riveroj Naturprotektita Asocio" kiu protektas bestojn, kaj ankaŭ subtenas la tibetan kulturon, kiu zorgis por reteno de la malstabila ekologia balanco en tiu veter-ekstrema regiono; Karma klopodis liberigi la pli junajn fratojn, kiuj estis kaptitaj ĉar ili malhelpis chinajn policianojn je nelegala chasado. Karma estis punita 2010-06-24 per 15 jaroj, la aliaj 5 kaj ĉ. 2 jara mallibereco. La germanlingva iniciativo petas subskribi por liberigi ilin. Lau Human Rights Watch la jur-afero ne observis la Homajn Rajtojn - havi advokaton kiu rajtas legi la kompletan akuzodokumenton kaj defendi la klientojn. <http://www.tibet-initiative.de/>

2011-03-10 P.R.Chinio: **52-jarigo de la popola levigo en Tibeto**, kaj 3-jara rememortago pri la kruela reago kontraŭ la protestoj. La registaro malpermesis turistajn vojaĝojn dum tiu tempo pro "malbona vetero" - jes - prave dirite, sed en metafora senco.
La tibetanoj postulas veran autonomion, respekton de la kulturo kaj naturo, kundecido-raĵton; ili kontraŭas la troan envadon de han-etnoj. Dalai Lamao sekvas la mezan vojon: Tibeto povas esti parto de P.R.Chinio, sed postulas veran autonomion. (lau taz, 2011-03-9, p.10)

2011-02-11 **Amdo/Chinio**: La kantisto Tashi Dhondrup estis liber-lasita. Li estis ĉ. 1 jaro en eduk-shangha gulago pro kantoj por la sendependeco de Tibeto.

2010-11-04 & 06 Karaj geamikoj, certe kelkaj el vi subskribis la **peticion kontraŭ la shtonumado** kaj finfine iamaniere **ekzekuto de Sakineh** Mohammedi Ashtianti. Jen - la registaro daurigas la kruelajhon: ili enprisonigis ankaŭ la filon de Sakineh, kiu klopodas savi la vivon de shia patrino. Bonvolu oferi kelkajn minutojn por subskribi peticion al la Ayatollah Khameini denove - nun por liberigo de ambau, la patrino kun la filo.
Kaj tio fakte ankaŭ substrekas, ke la mondo ne forgesis Sakineh - ĉar chiutage okazas kruelajhoj en la tuta mondo. Jen temas pri sistema kruelajho de shtato sub ia ideologio (la plej kruele nepensebla estis la Shoah - genocido - rilate Judojn, kaj Romaojn farita de Nazi-Germanio. Do, jen la pagharo en 6 lingvoj: <http://freesakineh.org/>

--- Europo ---

Belorusio: la restanta diktatoro malliberigas - sub nekontroleblaj kondiĉoj - la demokratojn. Li forshiris la maskon de duon-demokrato kiun li metis por trankviligi la politikistojn de la najbara EU. La popolo mutas por ne fali en la manojn de la represio.

Belarus malliberigis Andrej Sannikov kaj 6 aliajn iamajn kandidatojn pro la prezidenteco. Ili

organizis la protestojn kontraŭ la ne-libere organizitaj elektoj. Estas nur malmultaj ŝtatoj sur nia planedo, kie la registaro ankoraŭ tiom strange kaj absolutisme regadas. (laŭ ARD.de, 2011-05-14)

2011-05-24 **Rusio:** Mikaelo Khodorkowski ne rivecis liberecon. La apelacia jughkortumo en Moskvo nur reduktis la punon je 1 jaro al 13. AVE plurfoje raportis pri tiu kazo de arbitreca ekonomia neniigo - evidente laŭ decido de la iama rusa prezidento Putin. Al nomumis Khodorkowski kaj Lebedev senperfortaj politikaj malliberuloj.

2010-10 **Francio miniaturigas la atombombojn** - la minaco pligrandighos: La franca prezidanto Sarkozy inauguras etetajn nukleajn armilojn por morgaŭ. La paca movado denuncas tian akton de vertikala multigo. Temas pri la loko Lazer Mégajoule en BARP en Gironde. Tiuj novaj armiloj estos uzablaj en 2014 kaj poste. La unua parto de la armilo estos mal-grandigita. Sarkozy fieras pri modernigo de tiuj armiloj; laŭ li: per tiu modernigo Francio agadas por vertikala multigo de tiaj armiloj. (laŭ Mirejo)

Pri la vivo de Roma-oj:

Iliaj pagharoj: (de, en) <http://www.amarodrom.de>
kaj jen blogosfero de junaj Roma-oj - kun ligoj al diversaj landoj:
<http://www.ternype.eu/>

Europa Konsilio diskutis la situacion de Roma-oj en Europo:
kaj verkis la Strasburgan Deklaracion de 2010-10-20: (de, en, fr, it, ru)
http://www.coe.int/t/dc/files/events/2010_high_level_meeting_roma/default_de.asp?
Komento de Giankarlo: Mi opinias ke EU povus
- postuli de tiu komunumo propran registron de la naskitoj;
- starigi kadron de rajtoj kaj devoj de nomadoj

2011-04-28 **Hungario:** Nova konstitucio - naciisma, maldemokrata, mezepokeca:
http://www.verduloj.org/hungario_naciisma.htm

2010-12-23 La **Hungara Parlamento akceptis leghon por kontroli kaj puni se informoj ne estas sufiche "balancitaj"**, laŭ opinio de nova-instalota cenzur-aparato. La che-registara grupo de la parlamento posedas pli ol 70% de la voĉoj, kaj tiel povas decidi ĉion laŭ majoritato-demokratia reguloj. Multaj civitanoj en Hungario kaj en Europo esperas ke la Hungara Prezidento ne akceptas la leghon.

Daniel Cohn-Bendit kaj Rebecca Harms de la Europaj Verduloj/Regionalistoj/Piratoj en la Europa Parlamento protestis kontraŭ tiu legho kiu malkongruas kun la principoj de presmedia libereco laŭ la Charto de fundamentaj Rajtoj kaj la Europa Konvencio pri Homaj Rajtoj. Ili postulas korekto-proceduron de la EU-Komisiono laŭ artikolo 7 de la EU-Traktato. Laŭ-vice Hungario havas la EU-prezidentecon ek de Januaro, kaj ili ne povas imagi tion se tiu legho estos aktivigita. Vidu la komentojn de la Europa Verda Partio: <http://europeangreens.eu/menu/news/Verda/Regionalista/Pirata> frakcio en la EP: http://www.greens-efa.org/cms/pressreleases/dok/366/366037.hungary_media_law@en.htm

2011-04 EU subtenas siajn civitanojn:

Se EU-civitano eksterlande de EU ne trovas ambasadejon aŭ konsulejon de sia lando oni rajtas sin turni al tia de alia ajn EU-ŝtato.

La grava novaĵo laŭgrade ekfunkciis en Libio okaze de la nuntempa ribelo, kie la EU-civitanoj estis 6000, sed la reprezentitaj landoj estis nur ok. De nun la asistado estas rekta kaj povos koncerni perdon aŭ ŝtelon de dokumentoj, aŭ akcidentoj kaj reatoj okazintaj eksterlande.

Tio okazas kadre de la eŭropunia EEAS (Eŭropa Ekstera Agad-Sevo). (dankon al j-K Rinaldo)

2011-04: Lobi-skandalo en la Europa Parlamento.

EP-anoj ankau agadas kiel normalaj homoj, kaj kelkaj estas influataj pere de mon-donacoj au simila flatado flanke de la lobiistoj. Nun la EP-anoj diskutas pri pli severaj kaj formalaj reguloj por limigi la influon de lobiistoj. Pli da informoj de NRO, kiu aktivis kontraŭ lobiado kaj korupcio:
<http://www.lobbycontrol.de/blog/index.php?p=6071>